

PREZIDANTA BULTENO

Universala Medicina Esperanto-Asocio | Fondita 1908 | Aliĝinta al UEA



Stato de la UMEA

UMEA havas nun membrojn en 35 landoj. Spite de la fakto, ke la aliĝo al nia asocio estas senpaga, la kvanto de membroj kaj de la nacioj, kiujn ili reprezentas, bedaŭrinde iom stagnas. Kiel estas ekde multaj jaroj nun, la estraro konsistas daŭre nur el la prezidanto, kiu samtempe estas la redaktoro de la bulteno kaj kuneldonanto de „Medicina Internacia Revuo“.

Interreto

La Tvitro-konto de la UMEA, @UMEAeo, havas nun 415 sekvantojn.

Bondeziroj



UMEA deziras al ĉiuj legantoj kaj gesamideanoj benitan kristnaskon kaj bonan glitan en la novan jaron. Ni deziras al ĉiuj sanajn jaron 2022. Restu fortaj!

Ĉina Medicina Esperanto-Asocio aktivas

Profesoro Disheng Wang, agema estro de nia UMEA-sekcio en Ĉinio, organizis multajn eventojn dum la pasinta jaro. Pri tiu vi povas legi pli detale en la rubriko „Raportoj de la Landaj Delegitoj“. Ankaŭ li verkis novan libron, „Santeni vian vivradikon“. Profesoro Wang ege ŝatas kunlabori kun membroj de nia asocio por traduki la verkon en laŭeble multajn aliajn lingvojn. Se vi havas intereson helpi, bv. kontakti profesoron Wang senpere:

wangdisheng2168@aliyun.com

Jen komento el ĉina esperantlingva socia reto:

 **Puramo W Chong**
Admin · Just now · 

La teorisistemo de TĈM, ĝiaj elementoj, enhavo kaj strukturoj, ĉefe konsistas el la medicinaj sciigoj similaj al tiuj de MM kaj ĉina tradicia kulturo kiel la ĉina antikva filozofio ktp. Kiam malsamaj medicinistoj ekkonis la saman veron pri homkorpo, iliaj kompreno kaj sciigoj estis similaj aŭ samaj, nur malsamis esprimoj kaj lokalizoj en ilia nacimedica koordinato. Iliaj konsistoj kaj pensologikoj karakteriĝas per la ĉina tradicia kulturo ktp., al kiuj al kutimiĝas la popoloj kultivitaj per la ĉina tradicia kulturo.

Tiuj popoloj nekultivitaj de la ĉina tradicia kulturo nefacile al kutimiĝas al la karaktero de TĈM, kio fariĝas unu malfacilo por TĈM-sciigoj disvastiĝi tra la mondo kaj por pli multaj popoloj ekster Ĉinio akcepti ĝin, plue kio eble koloras TĈM per misteraj nuancoj, kaj dubigas multajn popolojn. Kiam oni mencias la vorton "vivradiko" al nuntempaj popoloj, ili eble pensas ke tiu estas nur imaga koncepto, eble en iu fikcio. Finfine tiuj famaj aserto kaj teorio (pri la "vivradiko") restas ankoraŭ fremda, nekonata por pli multaj popoloj en la mondo. Tio estas bedaŭrinda. Nature tiu signifiĉaj teorio kaj metodo estas ne favoraj kaj utilaj al ili.



Honorigo

Hungara Esperanto-Asocio okaze de la jubilea Zamenhof-Tago distingis s-inon **Katarina Faragó** kaj donacis al ŝi PRO ESPERANTO honordiplomon pro ŝia longjara sukcesa kaj fidela poresperanta agado. Aperis el la plumo de la honorigita ankaŭ la nova libro „Yumeiho Terapio“ (ISBN 978-615-00-2485-1), kiu estas patentigita je ŝia nomo ĝis la jaro 2029.

Forpasoj

Forpasis Étienne Flaubert Batangu Mpesa (1942-2021), eminenta Esperantisto el la Demokratia Respubliko Kongo. Li esperantistiĝis en 2015 kaj de tiam elstare kontribuis al la Demokrata-Kongolanda Esperanto-Asocio (DKEA), per verkado kaj tradukado kaj per redaktora kaj eldonista laboroj. Diplomito de la montreala universitato pri farmaciaj sciencoj, li estis esploristo, administranto 1990-2013 de la publika universitato de Kongo. Li fondis kaj kunfondis esplorcentrojn kaj membris en pluraj fakaj asocioj, i.a. la nacia asocio de farmaciistoj (1976-1977 li estis ĝia prezidanto) kaj la Nacia Konsilio de Ordo de Farmaciistoj, kies prezidanto li estis 2013-2018. S-ano Batangu Mpesa ankaŭ estis membro de nia UMEA. Li enkondukis diversajn kuracilojn en la merkaton, lastatempe ekz. „Manakovid“ kontraŭ KOVIM-19. Bedaŭrinde ni ne sukcesis ekscii ion pri la enhavo kaj efikprincipo de tiu kuracilo (Informoj pri la biografio resumitaj surbaze de la artikolo en Vikipedio).



Disheng Wang, ĉina medicina esperantisto, ĉiam profesias por medicino kaj Esperanto. Li diplomiĝis je Anhui Universitato de Tradicia Ĉina Medicino, kie li studis TĈM kaj modernan farmakologion, akirante la magistran titolon ktp..

Nun li profesias kiel vicprofesoro, direktanto de student-edukado de Bengbu Medicina Instituto kaj

kiel altaranga medicinisto en la dua hospitalo de la medicina instituto, okupiĝante pri TĈM-a kaj farmakologia instruadoj kaj enklina esplorado. Li multfoje partoprenis en plenumadoj de la medicinesploraj projektoj de sia provinco, akirante variajn premiojn, unu el kiuj estis la “Duaranga Premio de Eminentaj Inventoj” de la urbo Shanghai. Li publikigis diversajn disertaĵojn pri esplorado de nova receptado kun TĈD kaj racia aplikado de medikamentoj en kliniko, akirante lvariajn premiojn, i.a. la Shinoda-Premion de la UMEA kaj la Pirlot-Premion de la AIS San Marino. Kiel estro de la ĈMEA (la medicina komitato de ĈEL), en tiu rolo Landa Delegito de la UMEA kaj vicprezidanto de la Internacia Naturkuraca Asocio (INA) li faris kaj faras iujn laborojn por medicinaj Esperanto-organizaĵoj. Ekde 1985 profesoro Wang partoprenis en la kompiladoj de la Ĉina-Esperanta-Angla Terminaro de Ĉina Medicino kaj de la Ĉina-Esperanta Vortaro. En 2004, li eldonis sian verkon “Tradicia Ĉina Dieto”. Invitite honore de INA, li partoprenis ĝian akademian konferencon en Germanio, prelegante pri iuj enhavoj de TĈM el lia verko per Esperanto en 2014. Invitite de Norvega Medicin-Interŝanĝa Instituto, profesoro Wang donis trimonatan prelegserion pri la fundamenta teorio de TĈM ktp. per angla lingvo en Oslo 1998.

Vizito de pola delegacio en Hungario

La 5-an de julio 2021 alvenis en la urbon Hódmezővásárhely Prof. d-ro Włodzimierz Opoka kaj siaj kunlaborantaj profesorinoj. La kvarnombra delegacio traktis la venontjaran IMEK en urbo Szeged kaj Hódmezővásárhely kun la Dekano Prof. d-ro István Zubkó, vicdekano Zsolt Szakonyi. La delegacio renkontiĝis kun d-ro Péter Márki-Zaj, urbestro de Hódmezővásárhely, kiu promesis sian helpon. La Organiza Komitato de la 22-a IMEK gvidos la konata elstara Y-terapiistino s-ino Katarina Faragó. Depende de la pandemia situacio la 22-a IMEK okazos surloke en Hódmezővásárhely kaj Szeged, aŭ en la reto. La oficialaj lingvoj estos: Esperanto, angla, hungara kaj la pola.

Fonto: s-ino Katarina Faragó. Resumis: d-ro Imre Ferenczy

Sukcesaj Antikorpoj kontraŭ KOVIM-19

Laŭ informo en la plej aktuala eldono de la „New England Journal of Medicine“ (N Engl J Med 2021; 385:e81, DOI: 10.1056/NEJMo2108163) la kombinaĵo de du monoklonaj antikorpaj, kasirivimabo kaj imdevimabo, miksaĵo nomita REGEN-COV, havis bonan efikon por preventi danĝerajn komplikaĵojn de KOVIM-19 malsano ĉe pacientoj, kiuj havas grandan riskon (taksita laŭ speciala skalo), kiam donita frue post la diagnozo de la infekto. Jen ligilo al bilda resumo de la esplorrezulto:

https://www.nejm.org/doi/full/10.1056/NEJMo2108163?query=featured_coronavirus

Alia interesa kandidato estas sotrovimabo, donita por la sama celo kiel REGEN-COV (N Engl J Med 2021; 385:1941-1950 DOI: 10.1056/NEJMo2107934). Alrigardu https://www.nejm.org/doi/full/10.1056/NEJMo2107934?query=featured_coronavirus

La 22-a Internacia Medicina Esperanto-Kongreso (IMEK) okazos en Hódmezővásárhely kaj Szeged, Hungario

Post eminenta sukceso de la lastjara kongreso la 22-a IMEK okazos denove en Hungario, 13-a ĝis 17-a de Julio 2022, same kiel la lasta IMEK en formo de hibrida kunveno. Laŭ la pandemiaj kondiĉoj je la tempo de la evento, kongresanoj povas ĉeesti surloke, aŭ, laŭplaĉe, partopreni per interreto. Ĉeftemoj de la kongreso estos "La novaj eblecoj de diagnozado kaj kuracado de civilizaciaj malsanoj" kaj „La metodo de Masayuki Sajonji – historio kaj nuna stato”.

La Organiza Komitato jam prilaboris la detalojn. La 13-an de julio estos je la 9-a horo la malfermo en la Solena Halo de la Urbodomo. Posttameze vizito de la Biblioteko „Somogyi” en urbo Szeged kun kultura programo. Pluaj programeroj: fakaj prelegoj, promenado en Szeged, ekspozicioj, kongresa balo, ktp. Pli detalajn informojn bonvolu peti de s-ino Katarina Faragó (farago.kata@espmad.hu).

Fonto: s-ino Katarina Faragó. Resumis: d-ro Imre Ferenczy



Jen impresio de la biblioteko „Somogyi“ en Szeged

Nia honora prezidento reaktiviĝas

Imre Ferenczy mem raportas:

Mi informas niajn UMEA membrojn, ke ĉi-somere mi estis operaciita. Mi ricevis novan kardan ritmigilon (pacemaker) kaj fartas bone. Prof. d-ro *Włodzimierz Opoka* vizitis Hungaron komence de julio. Reveturine el Hódmezővásárhely ili kvarope vizitis min la 6-an de julio en urbo Győr. Mia edzino kaj mi gastigis ilin. Estis agrabla babilado pri la situacio de nia movado. La plej grava tasko estas la sukcesa organizado de

Nia mondo per datoj

Our World in Data

Ĉu vi ĉiuj jam konas la ret-paĝaron „Nia Mondo per Datoj“? Estas unu el la plej elstaraj kaj fidindaj fontoj de statistikaj datoj, ankaŭ pri la KOVIM-19 pandemio. Ĝi estas multe citita kaj tute senpage alirebla. Alrigardu ĝin je <https://ourworldindata.org/coronavirus>

nia 22-a IMEK. Mi mem promesis regule informi la neesperantistajn hungarajn gekolegojn pri la aranĝo. La 21-an de oktobro 2021 vizitis min s-ro *István Szabolcs*, la novelektita prezidanto de la Hungaria Esperanto-Asocio kaj la vicprezidanto: s-ro *Johano Nagy*. Ni longe babiladis pri la gravaj taskoj de HEA. Mi donacis al HEA 60 ekzemplerojn el miaj libroj por libera uzado en la novado. La libro enhavas raportojn el la diversaj UEA-, IFEF- kaj IMEK- Kongresoj. Nia landa asocio HEA intencas aperigi informilon por sia membraro. Jam aperis du n-roj. La redaktoro estas s-ino *Anna Bartek* (Anjo Amika). Mi estas kunlaboranto de la HUNGARA BULTENO. En ĝi mi informas niajn legantojn precipe pri la agado de UMEA.

Raportoj de niaj Landaj Delegitoj

Disheng Wang, Ĉinio:

ĈMEA agadis tute sub la ombro de la pandemio kaj laŭ strikta postulo de la registaro. Sub tiu situacio niaj medicinistoj plenumis pezajn taskojn monitori kaj preventi eblan pandemion. Kelkaj membroj de nia asocio aktive alvenis al kuracpostenoj, rekte klopodante en la preventado kontraŭ la epidemio. Nia asocio kuraĝis ilin fari tiujn laborojn kontraŭ la epidemio, kaj kelkaj el ili deĵoris en la “feb-ro-kliniko”, kie la kuracisto ekzamenis kaj determinis la malsanecon de ĉiu februlo por ĝustatempe trovi kaj ĝustatempe kuraci, evitante pluajn disvastiĝojn kaj infektiĝojn. Nia asocio neniam okazigis vizaĝ-al-vizaĝajn kunvenojn kaj diskutojn en tiu jaro.

La movado de nia asocio okazis kaj iris nur en la Wechat-grupo aŭ individue.

ĈMEA formis Wechat-grupon, en kiu niaj membroj povas lerni, studi, diskuti iujn informojn pri medicinoj kaj E-o en Ĉinio aŭ en la mondo, kaj ili povas interkomunikiĝi.

Ni invitis la esperantistan veteranon sindonan, sinjoron Li Weilun, instrui E-on en nia Wechat-grupo senpage.

Sinjoro Li Weilun rutine rakontis la interesajn aferojn kaj humoraĵojn en E-o, donis al ni la taskon traduki iujn poemojn aŭ proverbojn, kaj solvi enigmojn en E-o ktp..

Tiamaniere li instruas, kuraĝigas kaj gvidas la membrojn de nia asocio por lerni E-on, tra kio ni sentas persone la entuziasmon kaj dediĉon de unu esperantista veterano al E-o.

En la antaŭaj jaroj, nia asocio ĝustatempe kolektis koncernajn informojn pri KOVIM-19 kaj skribis kelkajn artikolojn por objektive raporti al UMEA realajn situaciojn pri la epidemiaj fortcoj, influoj kaj ĝiaj evoluoj, speciale ĝiaj epidemiaj ecoj, karakteroj kaj bazaj preventmetodoj kontraŭ ĝi kaj por fari niajn kolegojn koni reale aktualajn situaciojn pri la epidemio kaj taksu objektive la efikrezultojn de kuracado kaj preventado faritaj de ĉinaj popoloj.

Ĉi tiu jare mi ankaŭ havis tempon por resumi la cirkonstancojn kaj rezultojn por TĈM aktive kuraci la epidemion en Ĉinio el la alia vidpunkto. En la artikolo mi analizis la intimajn rilatojn inter la serioza periodo de la epidemio kaj la renjoj el



Afiŝo de la MOS:
„Neniu estas sekura ĝis ĉiu
estos sekura.“

TĈM, kaj ekde tia vidpunkto, mi taksis kaj eksplikis la raciecon de la protokolo pri preventado kaj kuracado de KOVIM-19. Ni ankaŭ interkomunikiĝis kun INA, kaj mi skribis kelkajn etajn artikolojn rilate al sano, laŭ iliaj postuloj. Ni aktive partoprenas en la propagando kaj intruado de E-o, kaj mi, invitive de la fremdlingva instituto de Ŝandong Provinco en Ĉinio, donis prelegon pri tradukado inter ĉina lingvo kaj E-o ekde februaro ĝis julio ĉi tiu jare.

Pro la pandemio, la prelego estis prezentite interrete.

Kaptante la okazon mi ankaŭ rekomendis simple ĈMEA kaj UMEA, koniginte al la studentoj iliajn disvolviĝojn en Ĉinio kaj en la mondo.

Ni elkore esperas ke la pandemio ĝisfunde eliminiĝos el la mondo kaj popoloj vivos la normajn vivojn en 2022, kiam eble ni povos aktive fari laborojn por la medicina Esperanto-movado.

Elvis Hakizumwami, Demokratia Respubliko Kongo

Pro KOVIM-19 nia akademia programo estis perturbita. Hodiaŭ mi estas en Doc.1 kaj espereble en la proksima jaro mi komencos Doc.2. Ĉiuj niaj profesoroj el eksterlando prokrastis siajn vojaĝojn pro tiu fi-viruso. Sed feliĉe ili ekvenas ĉar ŝajnas ke tiu pandemio ekmalfortiĝas, precipe en mia regiono. Cetere malmulaj homoj ne plu portas iliajn maskojn. Sed mi devas menciigi la reaperon de Ebolo en mia regiono, pecipe en la distriktoj Lubero, Beni kaj Butempo. Ĝis hodiaŭ 9 personoj mortis, kaj pli ol 500 personoj estas en klinika observejo. Tio signifas ke ni luktas kontraŭ du danĝeraj virusoj: Ebolo kaj Koronaviruso. Pri vakcino, verdire, malmulaj homoj jam ricevis iliajn vakcinojn kontraŭ KOVIM-19, sed oni rimarkas ke homoj interesiĝas pri la vakcino kontraŭ Ebolo.

Donacu vakcindojojn!

Vi ĉiuj scias, ke en multaj landoj vakcindojoj mankas kaj ke en multaj regionoj ankaŭ mankas la reto por efike disdoni ilin. Vi povas kontribui al plibonigo de la situacio per donaco al la tiurilata programo de la Monda Organizaĵo pri Sano (MOS).



Simple alklaku „Donate“: <https://gogiveone.org>
(Retejo en diversaj lingvoj)